



- **Ŝengeno: libereco,
ĝojiga ne por ĉiuj**
- **Gejofobio en Litovio**

**Demokratio
tia kaj alia**



La plej nova novelaro de Lena Karpunina

Neokazinta amo

kun 15 novaj rakontoj, inter kiuj kelkaj estis premiitaj.



Legintoj skribas:

“Se mi estus leginta nur unu rakonton de Lena Karpunina, mi povus konvinke aserti: la juna verkistino estas vere talenta. En stilo klara, laŭ bona tradicio de la rusa literaturo, la rakontoj pliriĉigas niajn mensojn, plibonigas niajn korojn.”



(Ignat Florian Bociort)

“Ŝia majstra talento verkista konsistas ĉefe el homa psikologio kaj kapablo prezenti eĉ la plej strangajn personojn tiel, ke la leganto akceptas kaj eĉ ekŝatas ilin. En la Esperanta literaturo tiu ŝia talento estas vere malofta.”



(Sten Johansson)

Prezo: 15 eŭroj + afranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo aŭ ĉe via kutima vendanto.

- ISBN: 90-77066-28-7
- Paĝoj: 150
- Serio Stafeto n-ro: 31

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Demokratio tia kaj alia

7

Laŭ konata karakterizo, el ĉiuj ŝtatformoj demokratio estas la malplej malbona, do - se oni volas diri tion pozitive - la plej bona. Tio tamen ne signifas, ke ĉie kaj ĉiam ĝi funkcias glate, kiel montras multaj aktualaj ekzemploj. Ankaŭ demokratio ne estas, ne povas esti perfekta. Ne sufiĉas formala demokratia strukturo por garantii sanan evoluon, se mankas unu aŭ pluraj gravaj komponantoj.



ALEJANDRO MEJIA GREENE

Malgajas turistoj geaj

10

Malgraŭ tio, ke la urba registaro de la litova ĉefurbo Vilnius insistas, ke ĉiuj turistoj estas bonvenaj, samseksemuloj malkonsentas. La retejo *touristiquementgay.com* avertas, ke regas en Litovio gejofobio.



Libereco, ĝojiga ne por ĉiuj

12

En decembro 2007 estis nuligita ajna kontrolo pri internaj ŝtatlimoj de la landoj apartenantaj al la ŝengena traktato. Ne ĉiuj litovoj ĝojas pri la aliĝo de sia lando al tiu zono. Liberecon deklarantaj ŝanĝiĝoj iom turmentas entreprenistojn.



Fosilioj en suda Germanio

18

En decembro 2004 ĉe eta vilaĝo apud Aŭgsburgo en gruzejo oni malkovris ion ege sensacian: skeleton de pra-elefanto unika en Germanio. Kiam mallongtempe poste komenciĝis elfosado, la fakuloj spertis pluan surprizon: ne nur pikdentoj konserviĝis, sed preskaŭ tuta skeleto de praŭlo de elefanto aĝa ĉirkaŭ 14 milionojn da jaroj. La posedanto de la gruzejo donacis la skeleton al la naturmuzeo de Aŭgsburgo, kie oni baldaŭ ekspozicios la unikan trovitaĵon.



FOTO DE LA KOVRILLO JAN GJAS

politiko

Montenegro	8
Albana buso atakita	
Albanio	8
Ŝoforo-angoro	

moderna vivo

Balta Maro	9
Algoj atakas	
Muziko	9
Not-inda konkurso	
Albanio	10
Kesto-sugesto	
Samseksemo	10
Malgajas turistoj geaj	
Ĉinio	11
Feliĉan naskiĝotagon!	
Montara mistero	11

ekonomio

Ŝengeno	12
Libereco, ĝojiga ne por ĉiuj	
Albanio	13
Libera internacia komerco kreskigas deficiton	

turismo

Serbio	14
Diabla urbeto	

komputado

Aparataro	16
Pli komforte labori per komputilo	

scienco

Arkeologio	18
Fosilioj en suda Germanio	

hobio

Ukrainio	21
Blazonoj de Ĥarkivo	

libroj

Inspira antologio	22
Facillingva legolibro	24

novelo

Nina kaj la knabo	25
-------------------------	----

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj.....	6
› El mia vidpunkto.....	7
› Anoncetoj.....	27

kiel pagi vian abonon de monato?

► Rekto al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko tratita je **belga** banko en **eŭroj**. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj


Ŝtato de la paganto	MONATO			La JARO aere	
	surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	23	27	13,8	5 9
Aŭstralio	AUD	82	90	49,2	9 17
Aŭstrio	EUR	49	53	27,6	5 9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5 9
Brazilo	EUR	23	27	13,8	5 9
Britio	GBP	34	37	20,4	4 6,5
Bulgario	EUR	25	29	15	5 9
Ĉeĥio	EUR	33	37	19,8	5 9
Danio	DKK	365	395	219	40 70
Estonio	EUR	25	29	15	5 9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5 9
Francio	EUR	49	53	29,4	5 9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5 9
Germanio (or.)	EUR	45	49	27	5 9
Grekio	EUR	45	49	27	5 9
Hispanio	EUR	45	49	27	5 9
Honkongo	EUR	41	45	24,6	5 9
Hungario	EUR	25	29	15	5 9
Irlando	EUR	49	53	29,4	5 9
Islando	EUR	49	53	29,4	5 9
Israelo	EUR	41	45	24,6	5 9
Italio	EUR	49	53	29,4	5 9
Japanio	JPY	7900	8500	4740	860 1460
Kanado	CAD	73	78	43,8	9 15
Kipro	EUR	33	37	19,8	5 9
Koreio	EUR	41	45	24,6	5 9
Kostariko	EUR	23	27	13,8	5 9
Kroatio	EUR	25	29	15	5 9
Latvio	EUR	25	29	15	5 9
Litovio	EUR	25	29	15	5 9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5 9
Malto	EUR	33	37	19,8	5 9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5 9
Norvegio	NOK	390	430	234	45 71
Nov-Zelando	NZD	95	103	57	10 18
Pollando	PLZ	99	110	59,4	22 36
Portugalia	EUR	41	45	24,6	5 9
Rusio	EUR	23	27	13,8	5 9
Singapuro	EUR	41	45	24,6	5 9
Slovakio	EUR	25	29	15	5 9
Slovenio	EUR	33	37	19,8	5 9
Sud-Afriko	EUR	41	45	24,6	5 9
Svedio	SEK	460	495	276	49 84
Svislando	CHF	82	88	49,2	9 15
Tajvano	EUR	41	45	24,6	5 9
Usono	USD	69	75	41,4	8 13
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5 9

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libro servo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libro servo@esperanto.org.au.
- **Aŭstria:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazila:** Brazilia Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasília. Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estona:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafoficejo@esperanto.fi.
- **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:**
 - Literatura-Servo "Espero", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schwering (Volksbank Grafschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo.ESPERO@t-online.de.
 - Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinete.de.
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakatsi. 1/3 III. 1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O. Kesto 17765-184, Tehran.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japana:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. Reto: esperanto@jei.or.jp.

- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O. Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: iwolemskatl@shaw.ca.
- **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperanto@saluton.net.
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miamiau1@ice.co.cr.
- **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date Crescent, Christchurch 8025. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- **Ruslandaj:**
 - Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zeiric@eunet.yu.
 - **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
 - **Svedaj:**
 - Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 - Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: beritl.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleidorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org.

Bojkoto?



Ĉinio pro la Olimpiaj Ludoj, kiuj ĉi-jare okazos en Pekino, kompreneble pli forte ol kutime estas en la fokuso de monda intereso. Tial estis bona okazo por tibetanoj per protestoj atentigi pri sia mizera situacio. Aliflanke nur naŭvuloj povis atendi, ke la reĝimo en Pekino ne brutale reagos al tia provoko. Tamen estis iom eksterordinare, kiom kruele kaj sange la ĉina armeo sufokis la ribeleton de tibetaj monaĥoj kaj civitanoj, kaj kiom furioze la registaro atakis la religian estron de Tibeto, Nobel-premiiton Dalai-lamao, kiun laŭvorte oni nomis „diablo”. Terurigite, la cetera mondo observis tiun tragedion, kaj ne malmultaj tuj postulis puni la ĉinan reĝimon per bojkoto de la Olimpiaj Ludoj. Sed ĉu tia bojkoto povus helpi tibetanojn? Tre supozeble ne.

Kial Ĉinio ŝanĝu sian politikon pri Tibeto, kiun en 1950 ĝi definitive uzurpis kaj baldaŭ komencis subpremi kaj neniigi per ĉiuj rimedoj? Ĝi ekstermis la tibetan kulturon, detruis preskaŭ ĉiujn templojn kaj monaĥejojn kun valoregaj art-trezoroj kaj bibliotekoj, ĝi mortigis laŭ fidindaj indikoj 1,2 milionojn da tibetanoj. Tamen Dalai-lamao, kiu fuĝis en 1959, konstante pledas por neperforto, pro kio li ankaŭ ricevis la Nobel-premion pri paco. Ke li nun nomis la persekutadon en sia hejmlando „kultura genocido”, aparte furiozigis la ĉinan registaron, sed li nur ripetis, kion jam en 1960 konstatis la Internacia Jurista

Komisiono en Ĝenevo en raporto pri la lando: „La komitato trovis, ke okazis ago de genocido en Tibeto dum provo detrui la tibetanojn kiel religian grupon.” La cetera mondo senreage observis tiun ekstermon de kulturo, kiu sendube estis unu el la plej teruraj krimoj de la pasinta jarcento.

Nun do Ĉinio aldonis plian krimon. Tion ni devas kritiki, sed estus malĝuste, se sportistoj kaj multaj aliaj eksterlandanoj ne vojaĝus al la Olimpiaj Ludoj. Male, ju pli multaj, precipe ĵurnalistoj, vizitos la landon, des pli malfacile estos por la reĝimo daŭrigi sian propagandon kaj kaŝi la veron. La gastoj neeviteble malkovros, kiom oni subpremas homajn rajtojn, ankaŭ en Ĉinio mem. Se okazis eraro, ĝin faris la Internacia Olimpika Komitato (IOK) antaŭe; ĉiuj nomitaj faktoj ja estis konataj antaŭ la decido akcepti la inviton al Pekino. Estus bone, se IOK estonte ne okazigus ludojn en landoj, kie homaj rajtoj valoras malmulte.

Sincere via

Stefan Maul

Stefan MAUL



www.monato.net

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 29a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopii: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.

Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Joan-Ferriol Masip i Bonet.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseoj:** Sendu al la koncerna redakto-ro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandsprese, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijkplei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koi-gakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congle-

ton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** Nicola Ruggiero, via Trento, 59 I-70042 Mola di Bari (BA). Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.

• **Scienso:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienso@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kal-verstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/a 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandsprese, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Militoj kaj nuboj

Kiel kutime mi ĝuas MONATO. Sed en la numero de marto 2008 kelkaj strangaĵoj perturbis miajn okulojn. Sub la titolo *Milito kaj paco* (MONATO 2008/3, p. 8), strange, Usono ne aperas inter la plej militemaj ŝtatoj, dum, ironie, alia titolo de la sama numero temis pri Nagasako, urbo kies popolo preskaŭ malaperis pro atombombo sendita de milita aviadilo, ne de blanka kolombo.

Alia artikolo, ne malpli dubinda, estas *Nuboj-duboj* (MONATO 2008/3, p. 13) sub la temtitolo *Pentroarto*. Nu, mi tre ŝatas pentroarton, sed la teksto trompis min. Ĝi simple parolas ne pri arto, sed pri anekdoto kontraŭkomunisma. Se iu volas makuli komunismon, tiu ne uzu nubajn aŭ dubajn vortojn. Nenion la aŭtoro menciis pri la arto mem. Feliĉe turistoj serĉas ne nur nubojn sur la pentraĵoj de la menciita epoko. Ŝajne pro tio, ke tro da nuboj minacas la homan vivon, la artistoj de la revolucio ne dubis pri tio, ke pli gravas hela suno, kiu sendube ankoraŭ nun hele kaj bele brilas en Ĉinio. Bedaŭrinde estas homoj, kiuj ne lernis vidi la arton laŭ la historiaj cirkonstancoj. Do mi petas al la redaktoroj kaj kunlaborantoj de MONATO: bonvolu ne pentri nubojn dum la venonta printempo, ĉar mi volas de-nove ĝui la sunan klarecon de mia plej ŝatata esperanta revuo.

Jozefo LEJTE
Brazilo

Bona por la eterneco

Aldone al la artikolo *La dika Krause? ... kedu min, sinjorino!* de Petro Desmet' (MONATO 2007/10, p. 23-24) mi ŝatus esprimi pri la recenzita verko kelkajn ĝeneralajn konsiderojn. *Großes Wörterbuch Deutsch-Esperanto* de profesoro Krause ne estas simple „dika”; ĝi estas *monumenta*, inda je nia sincera admiro, samkiel aliaj similaj kreaĵoj – hispana, itala, hungara kaj kelkaj aliaj; la aŭtoroj de tiaj ĉefverkoj meritas tutan dankemon kaj respekton de la esperantistoj.

Ni konsciu, ekzemple, ke la du-direktaj (Germana-Esperanto) leksikografiaj laboraĵoj de Krause postulis altan lingvistikan kvalifikon, bonegan regadon

de nia lingvo, ĉirkaŭ kvardekjaran laboron por kolekti, por selekti centmilojn da slipoj el libroj, gazetoj, radioelsendoj, el preskaŭ cent bibliografiaj laboraĵoj ktp, kiujn oni devis aranĝi laŭ klara kaj konsekvenca koncepto. Neniam tia laborego, kiun Krause faris fakte sola, estas pagebla, krom per niaj ĝojoj kaj kreiva utiligado. Similaj valoraj kulturaĵoj rolas ankaŭ kiel modelo: jen fideleco al Esperanto; ne vane trumpetadi pri „krizo”, ne kvereladi (ofte nur pro personaj ambicioj), sed daŭre, senlace pliriĉigi nian kulturon. Sur tiaj valoraj kreaĵoj, la antikvuloj kutimis skribi „bona por la eterneco”, kio diras, ke dum la estonta historio oni ne povas preterpasi la koncernan kreaĵon.

Certe, estas neperfektaĵoj ne nur en la niaj: la homaran kulturon konsistigas neperfektaĵoj ĉefverkoj. Oni povas imagi la stuporon de iuj tradiciaj lingvistoj kaj aliaj „kompetentuloj” antaŭ verkoj kiel tiu ĉi vortaro de Krause, ĉar ili „scias” jam „de-longe kaj definitive” nur pri la „povreta Esperanto kun kelkcentoj da vortoj”.

Ignat F. BOCIORT
Germanio

Kiuj sendependiĝu? (6)

Mi naskiĝis en la kvindekaj jaroj, kaj mia tuta eduko estis sub influo de eŭropeco: liberaj popoloj, demokratio, civitanaj rajtoj ktp. Por mi la koncepto de nacia ŝtato estas iom stranga, en la senco, ke, se ĉies rajtoj kaj devoj estus respektataj, oni ne bezonus tiujn postrestaĵojn de la pasinteco, kaj ĉiuj landoj povus facile formi pli grandan unuiĝon ...

Tial iom ĝenas min ĉi tiuj daŭraj disdividoj en pli malgrandajn naciecajn ŝtatojn ... Ĉu ni revenu al Italio de la 19a jarcento, kiam ekzistis 300 etaj ŝtatoj, kun monstraj problemoj de komerco, vojaĝado, permesoj, sistemoj ktp?

Sed mi estas filo de 50-jara eduko en paco, kunlaboro kaj toleremo ... Eble homoj, kiuj ne travivis tion, kaj ankoraŭ vivas en naciisma pensmaniero kaj travivis militojn kaj detruojn, pensas kaj agas alimaniere. Sekve de mia eduko kaj de 50-jara paco kaj kunlaboro mi tute ne povas imagi militon inter Italio kaj Francio, aŭ Aŭstrio, aŭ Svislando ... Mi favoras sendependecon de popoloj sub terura pre-

mo, sed kunlaboro inter la plej diversaj popoloj estas, laŭ mi, sendube ege pli profitodona ol militinspirita sendependecon. En ĉi tiu okazo oni devintus eble pli longe debati kun la serboj kaj trovi alian elirovjon ...

Roberto TRESOLDI
Italio

Kiuj sendependiĝu? (7)

Laŭ dialektika vidpunkto ne eblas vera sendependecon. Limo inter du teritorioj estas simbola streko por enskribi fikcion, nome nacion aŭ ŝtaton. La epilogo de tia historio estas de preskaŭ ĉiuj konata: la deĵoranta ekonomia elito subpremas la ceterulojn. Ĉu mi rajtas proponi analogion? Brazilo fariĝis „sendependa” ŝtato en 1822. La rezulto: post tiu dato Brazilo ne estis plu kolonio de Portugalio, sed aliforme de Anglio ... Hodiaŭ ni kantas la brazilan himnon, ni hisas nian flagon, ni ludas nian futbalon kaj ni amuziĝas per sambo kaj aliaj 2000 brazilaj ritmoj, kiuj eĥiĝas de limo al limo tra kontinenta lando. Tamen tiu, kiu vere regas la aferon, ankaŭ estras la usonan potencon kaj loĝas en la Blanka Domo. Kaj mi ne dubas pri tio: laŭ lia moŝto teritorio estas fikcio, himno resonas en borsoj, kaj flago estas mono. Se Kosovo troviĝas en la nuna mondmapo, ĉu la tiea historio estos tute alia? En la pasinteco Usono kaj Meksiko estis la unuaj ŝtatoj, kiuj agnoskis la sendependecon de Brazilo (dankon!). Bone, ĉu ankaŭ Meksiko jam agnoskis la sendependecon de Kosovo?

Jozefo LEJTE
Brazilo

Kiuj sendependiĝu? (8)

Sendependiĝo de Kosovo ne estas nur nacia problemo. La motivo estas la deziro de Usono alproksimiĝi al la limoj de Rusio. Duono de la loĝantoj de Kosovo ne naskiĝis tie, sed alfuĝis el Albanio, kiam Jugoslavio fartis pli bone ol Albanio. Tiam serboj estis bonaj kaj akceptis ilin, poste albanoj naskis po 10-12 infanojn, kaj nun ili estas la plimulto. Ĉi tie ne estas problemo interhoma, sed ega influo de la intereso de fortuloj!

Tereza KAPISTA
Serbio

Kiuj sendependiĝu? (9)

La sendependiĝo de iu lando estas trompogilo. Necesas vidi, ĉu la individuo estas libera aŭ ne.

Michel FAJRO
Francio

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Demokratio tia kaj alia

de Stefan MAUL

Laŭ konata karakterizo, el ĉiuj ŝtatformoj demokratio estas la malplej malbona, do – se oni volas diri tion pozitive – la plej bona. Tio tamen ne signifas, ke ĉie kaj ĉiam ĝi funkcias glate, kiel montras multaj aktualaj ekzemploj. Ankaŭ demokratio ne estas, ne povas esti perfekta. Ne sufiĉas formala demokratia strukturo por garantii sanan evoluon, se mankas unu aŭ pluraj gravaj komponantoj.

Krizoj kaj kvereloj

Eĉ tradicie demokratiajn ŝtatojn jen kaj jen trafas krizo, kies kaŭzo troviĝas en demokratio mem. Laste kun granda miro ni devis observi, kiel Belgio post normalaj parlamentaj elektoj dum monatoj restis sen registaro, ĉar la elektantoj voĉdonis tiel, ke la partioj havis grandajn problemojn, kunmeti koalicion kun klara plimulto da mandatoj.

Tia stranga rezulto lastatempe pli kaj pli ofte aperis post elektoj, ekzemple en Germanio, Aŭstrio kaj Italio. En Germanio kaj Aŭstrio voĉdonantoj devigis la du grandajn partiojn starigi komunan registaron. Oni povus atendi, ke en tia okazo estas facile regadi kaj rapide realigi urĝe necesajn reformojn, ĉar la plimulto en la leĝdona instanco (la parlamento) ebligas tion. Sed bedaŭrinde en ambaŭ landoj la grandaj partioj pli multe kverelas ol regadas. En Italio, kie oni kunmetis buntan koalicion el pluraj partioj kaj partietoj por malhelpi regadon de dekstruloj sub Silvio Berlusconi [berlusconi], la registaro disfalis pro ofte bagatelaj kvereloj inter la regantaj partioj.

Politikaj arlekenoj

Sur alia flanko estas ŝtatoj, en kiuj elektoj rezultigis klaran plimulton, ekzemple en Francio. Nicolas Sarkozy [nikolá sarkozi] venkis grandioze, sed la

nova prezidanto unue produktis daŭre novajn ideojn, kiuj baldaŭ montriĝis sapvezikoj, poste pro elstarigo de siaj privataj eskapadoj iritadis ne nur francojn; estas malfacile, ne karakterizi lin arlekeno. Sed jen kaj jen funkcia demokratio punas tiajn arlekenojn, kiel okazis al jam menciita Berlusconi kaj al naciistoj en Pollando, kiujn elektantoj forbalais el la registaro.

Regado kontraŭ la popolo

Alia demando estas, ĉu oni – en demokratio (= popolregado) – daŭre povas regi kontraŭ la volo de la popolo. Ŝajnas, ke jes. En Usono jam de longe ĉirkaŭ du trionoj de la civitanoj kontraŭas la Irak-militon, tamen prezidanto Bush [buŝ] obstine daŭrigas kaj defendas sian kruc-militiron bazitan sur drastaj mensogoj. Sed Bush ne plu povas kandidati por la posteno de prezidanto; sendube li kondukus alimaniere, se li devus batali por reelektiĝo. Restas la espero, ke civitanoj en Usono uzos sian potencon por korekti la politikan kurson.

Tiu korektebleco ja distingas demokration kompare al aliaj ŝtatformoj, precipe diktaturoj. Ni rigardu ekstotalismajn landojn en orienta Eŭropo. Multaj el ili enkondukis demokration kaj pluraj eĉ sukcesis membriĝi en

Eŭropa Unio (EU), ĉar ili plenumis intertempe sufiĉe da demokratiaj kriterioj. Sed ne ĉiuj evoluas bone, tiel ke la EU-komisiono laste devis forte kritiki Bulgarijon kaj Rumanion, ĉar tie lamas justico kaj ankoraŭ floras korupteco.

La plej granda el tiuj ekskomunistaj landoj, Rusio, ja formale enkondukis demokratiajn strukturojn, sed precipe sub prezidanto Vladimir Putin la regantoj forte reduktis la demokratiajn rajtojn. Plej draste tion oni faris pri amaskomunikiloj, kiujn intertempe preskaŭ komplete uzurpis Kremlo, tiel ke rusiaj civitanoj praktike aŭdas kaj legas nur propagandon. Sed demokratio sen libera ĵurnalismo estas kiel rivero sen akvo. Nur se civitanoj estas bone kaj objekte informataj, ili povas libere elekti. Krome en la sistemo „putinismo“ la sekreta servo estas same potenca kiel dum stalinismo. Kiel iuj en tia situacio povas nomi Rusion demokratio, estas enigmo.

Bonŝance preskaŭ ĉiuj veraj demokratioj spite al iuj problemoj kaj krizoj funkcias bone; perfekte ili ne povas funkcii, ĉar homoj ne estas perfektaj. Sed kutime demokratio pli-malpli frue ĉiam solvas problemojn. Do restas la enkonduke citita karakterizo, ke ĝi el ĉiuj ŝtatformoj estas la malplej malbona. Se ĝi ne ekzistus, ni devus inventi demokration. ■

Voĉdonantaj irakanoj en la onidire unuaj liberaj balotoj la 30an de januaro de 2005.





MONTENEGRO

Albana buso atakita

La 8an de marto turismaj grupoj el Albanio direktas sin al najbara Montenegro. Tiu ĉi tradicio daŭras ekde 1991, kiam la registaroj de ambaŭ landoj interkonsentis pri translima movado senvisa. La tradicio daŭris eĉ dum la intermilitoj en eksa Jugoslavio (Kroatio, Bosnio, Kosovo).

Ĝenerale albanoj kontentas pro la gastamo en najbarlandaj ripozejoj kaj turismejoj, ne nur pro relative malaltaj prezoj, sed ankaŭ pro la sekureco danke al la loka polico. Sed post la sendependiĝo de Kosovo, ankaŭ en Montenegro revigliĝis atakoj fare de tie troviĝantaj serbaj ekstremistoj.

La lasta okazintaĵo rilatas al 50-membra virina grupo albana el Tirano, kies buso estis dumnokte damaĝita. Longe devis atendi la virinoj, ĝis venis alia buso el Tirano. La polico montenegra tuj iniciatis esplorojn. En Albanio la gazetaro multe diskutis la aferon.

La nova ŝtato Montenegro konsistas krom etnaj montenegranoj ankaŭ el notinda elcento da serboj kaj albanoj.

Bardhyl SELIMI



JONAS AHLBERG

Donackupono

Donaco por via korespondamiko?

Donaco por la amikoj de Pasporta Servo kiuj tiel afable gastigis vin?

Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **12,25 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **24,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **49 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponon nun ĉe Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ rete ĉe monato@fel.esperanto.be.



ALBANIO

Ŝoforo-angoro

La 30an de marto, tagmeze, Mevlan Fejza stiris aŭton kontraŭ la ferdratan pordegon de la albana prezidantejo. La aŭto penetris kelkajn metrojn en korton, kie gardistoj arestis la ŝoforon. Tamen temis ne pri teroristo, sed pri viro kun psikaj problemoj. Lin oni ne enkarcerigis, sed kondukis al hospitalo.

Kelkajn monatojn antaŭe okazis samloke alia incidento, kiam junulino malvestis sin ekster la prezidantejo kaj staris nuda antaŭ la pordego. Tiam gardistoj kovris ŝin per lantuko kaj akompanis ŝin al policejo.

Bardhyl SELIMI

BALTA MARO

Algoj atakas

Ripozantoj ĉe Balta Maro ofte plendas pro algoj, kiuj kovras strandojn kaj post kelkaj tagoj putras kaj fiodoras. Antaŭ pluraj jaroj algoj aperis nur meze de aŭgusto kaj malabundis. Nun ili aperas multe pli frue kaj tre ĝenas ripozantojn.

Sciencistoj proponas diversajn kialojn. Laŭ botanikistino Jurate Kasperovičienė, la blualgoj en la maro kaŭzas varmega vetero kaj marpoluo. Tamen profesoro pri hidrobiologio Karolis Jankevičius opinias, ke kulpas ripozantoj, kiuj ne serĉas necesejon kaj urinas en la maro. En urino troveblas fosforo, la ĉefa kemia elemento, kiu instigas reproduktiĝon de la algo. La proceso komenciĝas, kiam en unu litro de akvo atingas la koncentriĝo de fosforo 0,5 miligramojn. Kiu urinas en la maron eligas ĉirkaŭ 5000 miligramojn da fosforo. Tiel, laŭ Jankevičius, formiĝas en 10 000 litroj da akvo sufiĉa koncentriĝo de fosforo por krei algojn. Aldonis la



PAUL PEEMERTS

Algoj difektas strandojn de la Balta Maro, sed sciencistoj ne interkonsentas pri la kialoj.

profesoro, ke se ripozantoj daŭre neglektos higienajn regulojn, algaj atakoj plioftiĝos.

Blualgoj ne nur estetike damaĝas la strandojn, sed ankaŭ povas provoki

alergiojn. Algoj ankaŭ eligas sulfuran hidrogenon kaj aliajn toksojn. Sekve la marbordoj fariĝas mortaj zonoj, en kiuj forestas fiŝoj.

LAST

MUZIKO

Not-inda konkurso

En la serba ĉefurbo Beogrado okazos inter la 20a kaj la 24a de majo la 53a Eŭrotelevizia Kanto-konkurso. Partoprenos kantistoj el 43 eŭropaj landoj. Gastigos la konkurson Beogrado, ĉar pasintjare la serba kantistino Marija Šerifović fariĝis laŭreato.

Konkursos unuafoje du ŝtatoj: San Marino kaj Azerbajĝano. Cetere Belgion la kantistino Ishtar reprezentos per kanto *O Julissi Na Jalini* en inventita, neekzistanta lingvo.

Dimitrije JANIĆ



BART MUSEHOOT

Belgion la kantistino Ishtar reprezentos per kanto „O Julissi Na Jalini” en inventita, neekzistanta lingvo.

ALBANIO



Vangjel Kapedani, antikvaĵisto el la urbo Elbasan, posedanto de malnova kesto kiu probable entenis la krucon de la sanktulo Joano Vladimiro.

Kesto-sugesto

Malnova kesto, nun posedaĵo de Vangjel [vanĝel] Kapedani, antikvaĵisto el la urbo Elbasan en centra Albanio, probable entenis la krucon de la sanktulo Joano Vladimiro. Vladimiro estis mortigita en la 11a jarcento sur insulo en la lago Prespo, ĉe la landlimo de Albanio kaj Makedonio. Laŭdire, senkapigite, li kunprenis sian kapon kaj forkuris.

Laŭ esploristoj la kesto devenas de la 17a jarcento kaj estas ellaborita de lokaj arĝentistoj. La kesto, kiu verŝajne entenis ankaŭ ostojn de la sanktulo, bildigas lin maldekstramane portantan sian kapon, kun kruco kaj palmo signifanta aliron al la paradizo.

Bardhyl SELIMI

SAMSEKSEMO

Malgajas turistoj geĵaj

Malgraŭ tio, ke la urba registaro de la litova ĉefurbo Vilnius insistas, ke ĉiuj turistoj estas bonvenaj, samseksemuloj malkonsentas. La retejo *touristiquementgay.com* avertas, ke regas en Litovio geĵofobio. Laŭ Vladimir Simonko, la estro de la Ligo de Litovaj Samseksemuloj, ekzistas en Vilnius nur du kluboj viziteblaj de samseksemuloj – kaj en unu okazis atako kontraŭ partoprenantoj en internacia geĵa konferenco.

Tamen la vicurbestro de Vilnius, Algirdas Paleckis, kontraŭas la opinion, ke ne bonvenaj estas samseksemuloj. „Ni tute ne diskriminacias kontraŭ samseks-emaj turistoj. Eble ekzistas diversaj rimedoj por plivigligi tiuspecan turismon, tamen mi dubas, ĉu tiaj streboj estus sukcesaj,” li diris.

Izoleco

Aliflanke agnoskas Paleckis, ke en orienta Eŭropo la sinteno al samseksemuloj malsimilas al tiu en okcidenta Eŭropo. Eble, laŭ Paleckis, kulpas la izoleco reganta dum la sovetia periodo: necesos do tempo, ĝis ŝanĝiĝos la sinteno. Opinio-sondado montras, ke la publiko ankoraŭ ne pretas akcepti publikajn aranĝojn por samseksemuloj. Laŭ Paleckis: „Ni toleras ajnan seksan orientiĝon, tamen ni donas prioritaton al tradicia familio kaj propagandas familiajn valorojn. Tial ni ne aprobas publikan montradon de samseksemaj ideoj.”

Simonko opinias, ke dum la venontaj 10 jaroj ŝanĝiĝos nenio en Vilnius. En la urbo okazis ne nur la kontraŭgeĵa atako ĉe la klubo *Soho*, sed ankaŭ pro-



Publike – kaj anglalingve – oni protestis en Vilnius kontraŭ samseksemuloj: „Litovio estos zono negeĵa.”

testoj kontraŭ samseksemulaj aranĝoj. Pro eraroj tiaj, laŭ Simonko, la urbo Vilnius suferis gravan malbonfamom. Por forviŝi ĉi tiujn makulojn necesos tempo kaj mono. Simonko kredas, ke necesos elspezi dekoble pli ol nun por plibonigi la urban bildon.

LAST

Feliĉan naskiĝotagon!

Laŭ la ĉina luna kalendaro la 13a de februaro estis la sepa tago de la unua monato. Fakuloj asertas, ke la sepa tago de la unua monato estas la tradicia ĉina Tago de Homoj, tio estas la naskiĝtago de la homaro.

En ĉina legendo (kiel en biblia rakonto) Nüwa [njuva] kreis kokon, hundon, ŝafon, porkon, bovon kaj ĉevalon en la unuaj ses tagoj, kaj la homon en la sepa tago. Pro tio Han-etnaj ĉinoj (la etno Han estas la plej granda etno de Ĉinio) opinias, ke la sepa tago de la unua monato estas la naskiĝtago de la homaro.

Monarko

Suna vetero en la Tago de Homoj estas bona signo. La „Libro pri Divenado”, verkita dum la Han-dinastio (206 antaŭ komuna erao – 220), diras: „La sepa tago estas la Tago de Homoj. Se estas sune de mateno ĝis vespero kaj vespere oni povas vidi stelojn, la popolo pace vivos kaj monarko kaj korteganoj harmonie kunlaboros.”

De Jin-dinastio (265-420) oni komencis porti kap-ornaĵojn aŭ glui orfolian hom-figureton sur fenestron. En tiu tago homoj en suda Ĉinio manĝas nekuiritan fiŝon, ĉar en la ĉina lingvo „nekuirita” havas saman prononcon kiel

„supreniri”, signifanta promocion, kaj „fiŝo” samas kiel „pli ol abunda”, signifanta riĉiĝon ĝis pli ol abundo. En iuj regionoj oni kutime manĝas nudelojn. Longaj nudeloj simbolas longan vivon.

Alice Liu

MARCO MAGRINI



Montara mistero

Antaŭ nelonge falis nekonata helikoptero en la norda montaro de Albanio, ĝuste sur monton Jezerca, 2600 m alta. Alarmon donis unue itala radara centro, frumatene. Poste atestis montaranoj, ke ili aŭdis eksplodon kaj kriojn. Malgraŭ malfacilaj kondiĉoj, inkluzive de neĝo kaj nebulo, serĉis la viron helikopteroj de la albana armeo. Tamen plurtaga esplorado rezultigis nenion.

Dume anoncis sin neniu pri perdita flugmaŝino. Kelkaj opiniis, ke temas pri malgranda privata aviadilo; aliaj eĉ pri naturfenomeno, ekzemple neĝolavango. Fine oni decidis atendi ĝis la somero, kiam la vetero estos pli bona, kaj serĉi helpe de alpistoj.

Bardhyl SELIMI



Libereco, ĝojiga ne por ĉiuj



Longaj vicoj de kamionoj apud internaj limoj de ŝengena landoj jam estas historio.

Malantaŭ tiu ŝildo validas reguloj de Eŭropo.



En decembro 2007 estis nuligita ajna kontrolo pri internaj ŝtatlimoj de la landoj apartenantaj al la ŝengena traktato¹. Ne ĉiuj litovoj ĝojas pri la aliĝo de sia lando al tiu zono. Liberecon deklarantaj ŝanĝiĝoj iom turmentas entreprenistojn.

Posedantoj de kafejoj en la litovapola apudlima urbeto Kalvarija jam komencis serĉi aliajn ejojn por sia agado. Antaŭe ŝoforoj de kamionoj pro la longaj vicoj ĉe la doganejo volonte venadis manĝi en unu el la multnombraj apudlimaj kafejoj. Dubinde, ĉu nun iu volos halti, se limon li povos trapasi senhalte.

En Litovio floris komercado de uzitaj aŭtomobiloj. Litovoj alportis ilin el okcident-eŭropaj landoj kaj en Litovio vendadis al eksaj sovetianoj. Precipe abunde venadis kazaĥoj. Litovaj entreprenistoj nun opinias, ke ricevinte ŝengenan vizon kazaĥoj prefere aĉetos aŭtojn en okcidenta Eŭropo sen aldone elspezi pro maklerado. Ĝis nun por ili estis pli facile ricevi vizon por Litovio ol por Germanio.

Direktoro Jonas Ŝčeponis de la kompanio *Kratonas*, kiu okupiĝas pri produktado de panaĵoj kaj kukaĵoj, ne dubas, ke en novaj kondiĉoj konkurado inter litovaj kaj polaj kompanioj akriĝos. „Jam nun poloj faris multajn ofertojn, por ke oni akiru iliajn produktojn. Iliaj prezoj estas malpli altaj sen reduktado de kvalito.” Lia opinio, la plej akra konkurado ekos ne inter produktantoj kaj vendistoj de panaĵoj sed inter tiuj de viandaĵoj. „Hodiaŭ poloj kapablas en Litovio akiri multajn porkojn, elporti ilin al sia lando, prilabori la viandon kaj reporti la finajn produktojn al Litovio. Konkurado kun ili ne estos simpla”, diris estro de apudlima kompanio el urbeto Kalvarija. Li certas, ke honesta konkurado preskaŭ ne eblas dum diferencas ŝtata politiko pri apogo de entreprenado.

Tamen lokaj ŝtataj oficistoj havas malsaman opinion. Pri la nova ŝengena situacio Vidmantas Pilvinis, fakestro pri investado en la magistrato de apudlima regiono Lazdijai, pozitivas: „La nova situacio favoras ĉiujn. Nun al najbara lando ĉiu povas iri ne nur per specialaj enirpunktoj, sed ie ajn.” Samtempe li



En Litovio ĝis nun furoris bazaroj de uzitaj aŭtoj.

konsentas, ke rezulte la entreprenado spertos plian konkuradon. „Jam nun en litovaj kompanioj laboras po-
loj kaj litovoj en la polaj. Tiuspecaj ekzemploj fariĝos pli oftaj.”

En la regiono Lazdijai pri varm-
igteknologioj kaj tegmentado de
loĝdomoj ĝis nun kutime okupiĝis
brigadoj el najbara Pollando. Ali-
flanke, jam ekde kelkaj jaroj en la
litovaj vendejoj la plej atendataj
klientoj estis poloj, kiuj amase
aĉetadis alkoholaĵojn kaj aliajn mal-
pli kostajn produktojn. Dume litovoj
el najbara lando elportas nutraĵojn
kaj legomojn. „Mi ne opinias, ke
nun poloj ekkonkeros ajnan nian ne-
gocon. Aĉetantoj estas bonvenaj kaj
produktantoj en nia regiono malmul-
tas”, resumas Pilvinis.

Ĉu turismo kreskos aŭ velkos?

Rima Jakyte, oficistino el la ŝtata
departemento pri turismo, ĝojas, ke
unu vizo por ŝengena zono nun mal-
fermos limojn al Litovio por turistoj
el Hindio kaj Ĉinio. Tamen samtem-
pe ŝi konfesas sian maltrankvilon
koncerne novan vizan sistemon, kiu
malfavore rilatas la tradiciajn turis-
tojn. „Niaj turismaj agentejoj, kiuj
laboris kun turistoj kaj entreprenistoj
el Belorusio kaj Kazahio, malĝojas.

Nun por la vizo al Litovio ĉiuj devas pagi 60
eŭrojn, dum antaŭe belorusoj pagis nur 5 kaj
kazahoj nur 35 eŭrojn. Tiun altiĝon ankaŭ

bedaŭras kuracejoj de la kuracloka urb-
eto Druskininkai, supervendejoj de Vil-
nius, etaj hoteloj kaj vendistoj de uzitaj
aŭtomobiloj.”

Tomas Norbutas, direktoro de *Ka-
pratas*, la plej granda kompanio nego-
canta pri uzitaj aŭtomobiloj en la urbo
Marijampole, en la nova situacio vidas
almenaŭ unu avantaĝon por Litovio kaj
ne perdas optimismon. „Kompare kun
malnovuloj de Eŭropa Unio, en Litovio
kazahoj povas libere komuniki en la rusa
kaj ĉi tie tranoktado kaj nutrado malpli
kostas ol en Okcidento.”

LAST

1. Schengen [ŝengen] estas urbo en Luk-
semburgio. Ĝi iĝis ĉefe konata pro tio, ke
la 14an de junio 1985 kvin landoj (Belgio,
Francio, la Federacia Respubliko Germanio,
Luksemburgio kaj Nederlando) tie sur ŝipo
subskribis traktaton celantan la forigon de
limkontrolo.

ALBANIO

Libera internacia komerco kreskigas deficiton

**Dum 2006 Albanio plenumis la formalizaĵojn por aliĝi al
CEFTA, la interkonsento por libera komerco de centra
Eŭropo. Meze de 2006 ĝi ankaŭ subskribis stabiligan
traktaton kun Eŭropa Unio.**

Dum la dua kvaronjaro de 2007 la
komerca deficito de Albanio atin-
gis 727 milionojn da usonaj dola-
roj (USD), do je ĉirkaŭ 70 milionoj pli
ol dum la simila tempoperiodo lastjara.
Estis importitaj varoj je ĉirkaŭ unu mi-
liardo da USD kaj eksportitaj nur je 277
milionoj. Albanio perdas notinde pro

komerco kun la landoj de la regiono kiel
Makedonio, Kroatio, Montenegro, Bos-
nio-Hercegovino, Kosovo kaj Moldavio,
sed ankaŭ kun pli evoluintaj landoj. La
ĉefa enspezofonto de la lando nun estas
la transpagoj de albanoj laborantaj en
Italio, Grekio kaj aliaj landoj.

Bardhyl SELIMI

SERBIO

Diabla urbeto



En suda Serbio, proksime al la urbeto Kuršumlja, je ĉirkaŭ 90 kilometroj de la urbo Niš, troviĝas rimarkinda miraklo de la naturo. Ĝi estas konata sub la nomo Diabla Urbeto. Temas pri 202 ŝtonkolonoj, kiuj altas de 2 ĝis 15 metroj kaj larĝas de duona metro ĝis tri metroj. Cetere, tio estas naturfenome-

no unika en Serbio kaj tre malofta en la mondo.

Ŝtonkolonoj ekestis sekve de erozio sur tereno de malkompakta grundo. Iam tiu tereno estis centro de vulkana aktivado. Tamen homo estas „krimulo”. Oni detruis arbaron, kaj rezulte de la akvoefiko dum centoj da jaroj estiĝis ŝtonturoj. Sur iliaj pintoj staras ŝtonĉapoj, kiuj servas

kiel pluvombreloj, sed la akvaj torenoj plu alportas teron, kaj la kolonoj plialtiĝas.

Pro siaj nombro, grandeco kaj stabileco la Diabla Urbeto estas la plej konata natur-monumento de tiu speco en Eŭropo. Ĝi estas proklamita kiel nacia naturvaloraĵo de eksterordinara graveco kaj troviĝas sub ŝtata protekto.



DIMITRIJE JANIĆ

La Diabla Urbeto, miraklo de la naturo.

En la popolaj legendoj oni mencias, ke tiuj ŝtonkolonoj estas ŝtonigitaj nuptogastoj, kiuj volis laŭ la deziro de diablo edzigi fraton al fratino. Kompren-

eble, Dio punis tiun geedzigan feston. Nuntempe la Diabla Urbeto estas nur turisma allogaĵo.

Dimitrije JANIĆ

Apud la neordinara ŝtonurbeto ekzistas du mineralaj fontoj. La unua, en Diabla Kanjono, estas tre acida (pH 1,5) kun alta enhavo de mineraloj (15 g/l), kaj la dua fonto, nomata Ruĝa Fonto (pH 3,5), estas kun malalta enhavo de mineraloj (4372 mg/l). La mineralakvo el ambaŭ fontoj estas tre utila por kuracado de diversaj malsanoj, asertas fakuloj.



DIMITRIJE JANIĆ

Pli komforte labori per komputilo

En televido oni ofte vidas borsmakleristojn aŭ trafikgvidantojn, kiuj havas aron da komputilaj ekranoj antaŭ si. Ion tian ankaŭ mi jam delonge deziris havi. Sufiĉas du ekranoj: ekzemple sur unu ekrano troviĝus librotenaj ciferoj, kaj sur alia ekrano mi verkus analizon de la librotenado. Ja eblas samtempe sur unu ekrano montri plurajn programojn, sed tiam la laborspaco estas tre limigita.


Por realigi tion estas bezonata plia grafika karto en la komputilo, aŭ grafika karto, al kiu eblas konekti plurajn ekranojn. Strangas, ke ĝis nun mi

nenie sukcesis trovi komputilon, en kiu tio estas antaŭinstalita. (Tio ne plu estas problemo por iom moderna tekokomputilo: sufiĉas alĝustigi la instalon kaj

eventuale instali novan zorgilon por havi malsaman bildon sur la propra kaj la aldona konektita ekrano.)

Jam antaŭ kelkaj jaroj mi interrete esploris la eblecojn. Evidentiĝis, ke aldone aŭ anstataŭigo de grafika karto estas ne simpla kaj tre riska afero. Mi ne volis fari tion mem, sed iris al komputilvendisto kaj petis lin adapti mian (tiam ankoraŭ relative novan) komputilon, por ke mi povu konekti duan ekranon. Li tuj rifuzis, ĉar tio laŭ li nur eblas kun tute nova komputilo. Ĉe malnova komputilo tia interveno kaŭzus senfinan aron da problemoj. Mi do hejmeniris kaj decidis pacienci kelkajn jarojn, ĝis venis bezono je nova komputilo. Duonjaron poste mi tamen aĉetis pli grandan ekranon kaj malvolonte metis la originan ekranon en ŝrankon.

La sopiro restis, kaj antaŭ unu jaro mi trovis, ke ne nepre necesas malfermi la komputilon kaj aldoni grafikan karton por konekti plian ekranon. Aĉetebblas en Usono eta aparato, *Triton SEE2*, per kiu eblas ligi ekranon al la komputilo per ĝia USB-pordo. La aparato ne kostis multe (proksimume 80 dolarojn), kaj mi decidis mendi ĝin ĉe granda retvendejo, *amazon.com*. La mendoproceduro funkciis glate, ĝis venis la momento por indiki la sendadreson: ne eblis liveri ĝin al eŭropa adreso. En mialandaj vendejoj mi ne trovis la aparaton. Antaŭ nelonge mi denove provis, sed eŭropaj mendoj restis neblaj. Dum la esploro mi tamen trovis similan aparaton, *logear USB 2.0 Video Card*, ĉe eŭropa retvendejo. La prezo estis simila, sed en eŭroj, do reale konsiderinde pli alta.



CLIVE DARR

Unua fazo: instalo kaj konekto

Mi faris la mendon kaj kun ĝojo legis en la mendokonfirmo, ke la antaŭvidita liverdato estis post du labortagoj. Mi sekvis per la retpaĝo de la vendejo la plenumon de mia mendo. Tie la liverperiodo bedaŭrinde variis inter 1 kaj 3 semajnoj. Finfine, post 20 tagoj alvenis grandega koverto kun eta aparato, proksimume same malgranda kiel poŝtelefono. Mian malnovan ekranon mi jam prenis el la ŝranko, do mi komencis (leginte la instrukcilibreton) konekti la aparatojn kaj instali la programaron.

Post instalo eblis konstati, ke la komputilo iel eksciis pri la ekzisto de dua ekrano, tamen ne venis bildo sur ĝi, kaj ne estis instrukcioj pri kio restis farenda. Mi malŝaltis la komputilon, manĝis kaj poste reŝaltis ĝin. Tiam, surprize, aperis nekonata programo, kiu finpretigis la instaladon kaj detale klarigis kiel movi programon de unu ekrano al alia, kaj tiel plu. La programo nomiĝis *NVIDIA*: la helpprogramo de la origina grafika karto de mia komputilo. Mia ĝojo daŭris nur mallonge: dum la postaj tagoj la dua ekrano fojfoje estis uzebla, fojfoje ne.

Mi traserĉis la retpaĝojn de la vendinto, sed vane: ja estis helpopaĝoj, sed neniu informo pri mia aparato. Fine mi skribis kaj klarigis la problemon. Tuj venis respondo, ke mi malinstalu la programon liveritan kun la aparato kaj instalu novan version, kies referenco estis aldona. Dum horoj mi instalas, malinstalas, reinstalas ... tiun programon, sed ne sukcesis. Ĉar la proponita nova programo ne estis de *Iogear*, sed de *DisplayLink*, mi finfine tie serĉis klarigon de la problemo. Mi ne trovis klarigon, sed estis antaŭa versio de la programo, kelkajn monatojn pli malnova. Tiun mi sukcese instalas kaj, post kelkaj komencaj problemoj, mia komputila sistemo nun stabile funkcias. En www.displaylink.com/shop.html estas menciitaj kelkaj similaj aparatoj.

Dua fazo: aldono de komputila memoro

Dum la esploroj mi eksciis, ke dua ekrano konektita per USB-pordo funk-

cias iom malpli rapide kaj ke ĝi kaŭzas plian ŝarĝon por la komputilo. Plej simpla metodo por plirapidigi komputilon estas aldoni labormemoron („RAM”), sed por tio estas problemoj similaj al tiu de grafika karto: necesas malfermi la komputilon, kaj ne facilas trovi la taŭgan specon de memoro. Por la lasta komputila generacio, kun la mastruma sistemo *Vista*, eblas pligrandigi la labormemoron per ekstera memorkarto kun la helpprogramo *ReadyBoost*. Por malpli novaj komputiloj la rusa kompanio *eBoostr* (www.eboostr.com) verkis similan programon.

Mi decidis akiri kaj instali *eBoostr*, des pli ĉar ĝi estas senpaga (sed oni toleru la oftajn proponojn por aĉeti ĝin). Mi uzis SD-karton de unu gigabajto, ĉar en mia komputilo estas neuzata legilo por tia karto.

Malfacilas diri, kiugrade *eBoostr* efikas. En komputilo funkcias multaj programoj samtempe, ofte sen tio, ke la uzanto konscias. Apenaŭ eblas fari fidindan teston sen kaj kun la aldona labormemoro. Unu konstato de recenzisto ankaŭ ĉe mi konfirmiĝis: la starto de komputilo konsiderinde plirapidigas, sed al tio oni rapide alkiutimiĝas, kaj oni ne plu rimarkas la pliboniĝon. Mi faris teston kun malfermo kaj reordigo de grandega *Access*-datumbazo kaj unuafoje ne vidis diferencon. Mi refaris la teston kun nova versio de *eBoostr*, kiu intertempe aperis, kaj nun tamen spertas plirapidigon.

Mi aldonu, ke la dua fazo fakte realiĝis antaŭ la unua fazo. Pro la longa livertempo mi decidis tuj instali *eBoostr*, sen scii, ĉu mi vere bezonos ĝin por bona funkciado de dua ekrano.

Tria fazo: turni la ekranon de „pejzaĝo” al „portreto”

Ne nur la grandeco kaj kvanto de ekranoj influas la laborkomforton, sed ankaŭ ilia pozicio. Komputila ekrano es-

tas postsekvanto de televida ekrano, kiu siavice klopodis imiti la larĝan kinejan ekranon. Ĝia larĝeco estas pli granda ol ĝia alteco, sed niaj kutimaj informfontoj (libroj, gazetoj, leteroj) estas pli altaj ol larĝaj. El tio rezultas, ke, verkante leteron aŭ legante libron per komputilo, oni neniam povas vidi la tutan paĝon. Turno de la ekrano je 90 gradoj, de „pejzaĝo” al „portreto” bildo, solvus tiun problemon, sed ankaŭ tiurilate la komputilfabrikantoj estas konservemaj. Nur iom post iom aperas ekranoj, kiujn oni povas turni. Krome estas bezonata aldona programaro.

Por mi la problemo de programaro estis simple solvita: en la menuoj de *DisplayLink* estas la elekto inter „pejzaĝo” kaj „portreto”. La restanta problemo estis mia ekrano. En ĝia manlibro mi legis, ke eblas turni ĝin, sed iom kaŝe estas aldonite, ke tio eblas nur por kelkaj specoj de la ekrano, bedaŭrinde ne por mia. Mi iel devos malmunti kaj remunti ĝin por havi ĝin en la dezirata pozicio.

Konkludo

Mi spertis multajn problemojn por funkciigi la du ekranojn (sed mi de antaŭe estis bone avertita pri tio). Mi nun povas profiti de la rezulto, kaj vere, la pli granda komforto valoras la penon. Fakte, por mi estas miraklo, ke aro da aparatoj kaj programoj de diversa origino tiel bone kunlaboras. Oni tamen povas demandi sin, kial la produktantoj tiom neglektas siajn klientojn, liverante eksmodajn aparatojn aŭ aparatojn avangardajn kun nesufiĉa dokumentado kaj kripla programaro.

Dum kelkaj jaroj la proceduro, kiun mi priskribis, povos doni duan vivon al ne plu uzataj ekranoj, sed baldaŭ ĝi iĝos senutila. La formato de la ekranoj daŭre pligrandiĝas, kaj jam nun je ne tro alta prezo aĉetblas ekranoj, kiuj povas montri du A4-formatajn bildojn apude.

Roland ROTSART



Kontribuojn por la rubriko **Komputado de MONATO** kunlaborantoj sendu al komputado@monato.net.

Fosilioj en suda Germanio



Elfosado de Turiasaurus.


Turiasaurus: ostoj de maldekstra brako.



Fosilio de la mondvaste konata „prabirdo” arkeopterigo troviĝas en la Londona Naturhistoria Muzeo (fondita el parto de la Brita Muzeo), kiu ĝin aĉetis tuj post ĝia malkovro en 1861. Kaj en la Berlina Muzeo por Naturscienco de la Humboldt-Universitato estas la probable plej bela kaj kompleta ekzemplero.

Ambaŭ kaj pliaj aliaj troviĝis en supra ĵurasio kaj devenas el ŝtonrompejoj proksime al Solnhofen kaj najbaraj urboj en suda Germanio. La lasta estis trovita en 1992 (*Brockhaus multimedial*) aŭ en 2005 (*Vikipedio*).

Krom tiuj vaste konataj fosilioj la molaso en suda Germanio, antaŭ jar-milionoj ŝutiĝinta de la alpoj, konservis multajn interesajn bestojn kaj plantojn. Inter ili troviĝas fiŝoj, akvolilioj, skeleto de mezosaŭro, flugsauro, kraboj, terciara hipokampo, skorpio el la kretaceo,



Turiasaurus - rekonstrua bildo.

Skeleto de Pelycosaurus elfosita en Turingio






Elfosado de mamuto en suda Bavario norde de Augsburg.



Stabiligo de rompiĝemaj ostoj per malmola ŝaŭmo.



Dentoj de Turiasaurus.

fosilia rano kun konserviĝinta haŭto el la mioceno. Videndaj estas fosiliaj piedsignoj kaj spuroj kaj birdovoj el la kratero Ries [ris], fosiliaj ginko-folioj, insektoj en sukceso kaj impresa trovo de makzelo de antropomorfa prasimio el la ĉirkaŭaĵo de Augsburg.

Troveblas ĉiaj fosiliaj bestospecioj, de stomatolitoj el antaŭkambrio ĝis restoj de vertebruloj el la glaci-epoko. Inter la trovitaj senvertebruloj estas precipe amonitoj kaj ĵurasiaj spongoj.

Kompare al la teksasaj flugsauroj, la ĵurasiaj el Solnhofen kaj Eichstätt [ajhstet] estis nanoj: de pasera grandeco ĝis maksimume la grandeco de aglo.

En decembro 2004 ĉe eta vilaĝo apud Augsburg en gruzejo oni malkovris ion ege sensacian: skeleton de pra-elefanto. Fakuloj identigis ĝin kiel Arkeobelodonon. Ĝi estas unika en Germanio, en Eŭropo nur unusola plia ekzemplero estas en Parizo, mondvaste ankoraŭ unu en Kairo.

Paleontologo miris, malkovrinte du brunajn striojn en argilo de la gruzmuro: eburo de elefantecaj pikdentoj. Tuj li sciis, ke li malkovris ion nekutiman.

Kiam mallongtempe poste komenciĝis elfosado, la fakuloj spertis pluan surprizon: ne nur pikdentoj konserviĝis, sed preskaŭ tuta skeleto de praŭlo de elefanto aĝa ĉirkaŭ 14 milionojn da jaroj. Pro la eluzo de dentoj oni supozas, ke la besto mortis pro aĝokadukeco, kaj la formo de la pelvo indikas, ke ĝi estis vira besto.

Ses semajnojn sciencistoj laboris por elfosi kaj savi la skeleton. Oni ne volis perdi tempon, por ke la elfositaĵoj ne disfalu en la aero. Tage kaj nokte la sciencistoj restis tie por gardi la valoran trovitaĵon kontraŭ vandalaj scivol-emuloj kaj stultuloj. Helpema buĉisto ĉiutage provizis la teamon per nutraĵoj. Fakuloj moknomis la elefanton *backleg* – „malantaŭgambulo”, ĉar mankis la antaŭaj gamboj de la skeleto.

La posedanto de la gruzejo donacis la skeleton al la naturmuzeo de Augsburg, kie oni baldaŭ ekspozicios la unikan trovitaĵon.

Jomo IPFELKOFER

Blazonoj de Ĥarkivo

En heraldiko la vorto „blazono” signifas specifajn figurojn aŭ simbolajn pentraĵojn, emblemojn, per kiuj oni distingas ŝtatojn, urbojn, nobelojn k.a. En sia ĝisnuna historio Ĥarkivo havis plurajn blazonojn.

De la tempo, kiam Ĥarkivo estis fondita (1654), ĝi kelkfoje ŝanĝis sian emblemon. La plej malfacila tasko estis trovi spurojn de la unua blazono, ĉar ne restis dokumentaj fontoj. Laŭ kelkaj informoj tamen, la unua urba blazono aperis, kiam Ĥarkivo estis regimenta centro meze de la 18a jarcento. La tiama emblemo prezentas streĉitan pafarkon kun enmetita sago sur flava fono, kaj ĝi kiel blazono de la urbo poiome aperas sur la urba sigelo. Poste ties koloroj ŝanĝiĝis: la fono iĝis verda, kaj la pafarko flava.

En la jaro 1781 oni aprobis novan blazonon. Ĉi-foje temas pri la blazono de la ĥarkiva gubernio. Ĝi aspektas kiel heraldika franceska ŝildo (kvarangula kun pikilo sube). Sur verda fono de la ŝildo estas pentrita korno de abundeco, plena je fruktoj kaj floroj. Ĝenerale la verda koloro en heraldiko signifas esperon, ĝojon. Tial la korno de abundeco simbolas naturan riĉecon de la regiono. La aŭtoro de la blazono estas duko Ŝĉerbatov.

Meze de la 19a jarcento estis reviziitaj ĉiuj ekzistantaj guberniaj kaj aliaj blazonoj. La kialoj estis, ke pluraj el ili havis certajn malperfektaĵojn el heraldika vidpunkto, ĉefe mankis monarkiaj simboloj. Aperis nova projekto de blazono, aprobita meze de 1878. Ĝia kreinto estas barono Kene. Poste dek jarojn Ĥarkivo havis blazonon, sur kiu sur arĝenta ŝildo la aŭtoro pentris nigrakoloran ĉevalkapon. Supre estis pentrita sespinta orkolora stelo inter du bizancaj moneroj. Tiu ĉevalkapo estas pruvo, ke en la regiono ekzistis pluraj ĉevalbredejoj. La stelo atestas, ke en la urbo estis universitato, kaj la mone-

roj simbolas komercon kaj riĉecon. La supraĵo de la blazono estas imperiestra krono.

Ĉu estis strange aŭ ne, sed tiu blazono provokis plurajn kontraŭdirojn kaj protestojn de la flanko de la nobelaro, kaj laŭ ĝia peto oni restarigis la malnovan emblemon kun la korno de abundeco, sed aldone al ĝi supre, kiel en la blazono de 1878, estis pentrita imperiestra krono. Tiun urban blazonon oni uzis ĝis la jaro 1917.

Dum tre longa periodo (1917-1968) Ĥarkivo ne havis emblemon. Nova blazono dum la sovetia regado aperis en decembro 1968. Ĝia aŭtoro estas la pentristo J. Jegorov. La koloroj estas ruĝa, blua, blanka. Supre estas bildo de metala dentrado – simbolo de la industrieco. Sur blanka fono estas pentrita ora



La blazono de la ĥarkiva gubernio.

spiko, ĉirkaŭ kiu „rondiras” elektronoj. La blanka koloro estas simbolo de paco, la ruĝa kaj blua koloroj memorigas pri la ruĝblua standardo de Sovetia Ukrainio, kaj la elektronaj orbitoj reprezentas la sciencan aktivadon kaj nukleajn esplorojn.

En la jaro 1995 la ĥarkiva registaro decidis ŝanĝi la aspekton de la urba blazono, transprenante denove la konatan emblemon kun la korno de abundeco, ĉar ĝuste ĝi plej trafe simbolas la urbon.

Dmitrij ĈIBULEVSKI



La blazono en la 18a jarcento.



Nova projekto de blazono, aprobita meze de 1878.



Tiun urban blazonon oni uzis ĝis la jaro 1917.



Nova blazono dum la sovetia regado aperis en decembro 1968.

Inspira antologio

Inter la disponeblaj eldonaĵoj en Esperanto estas kreskanta nombro da poeziaj antologioj. Sur miaj librobretroj troviĝas pluraj. Krom la impona jubilea Esperanta Antologio, kompilita de William Auld, mi havas naciajn poemarojn: hungara, ĉina, germana, angla ktp. Nun mi havis la okazon esplori pli novan nacian antologion – ĉi-foje el Brazilo. Por mi la sperto estis ekscita kaj spirite riĉiga, ĉar laŭ pli ol unu aspekto ĉi tiu verko estas unika. Sylla Chaves, unu el la du kompilintoj, tiel klarigas sian motivon:

Mia intenco ne estas prezenti plian poemaron, verkitan de pluraj lertaj poetoj, ĉar jam ekzistas sufiĉaj. Nek pruvi, ke Brazilo meritas elstaran lokon en la Esperanta Parnaso. Mia celo estas pli ambicia. Mi volas montri, ke inter brazilaj poetoj (esperantistaj aŭ ne) estas multaj, kiuj, krom belecon ankaŭ celas la ekeston de pli bona mondo malpli egoisma, pli paca, pli justa, pli tolerema, pli racia kaj pli amika de la naturo, kiu nin ĉirkaŭas.

Tiun ĉefan celon (ĉar la kompilintoj havas du aliajn), la poemaro abunde plenumis.

La poemaro estas dividita en du sekciojn. La unua konsistas el 118 originalaj poemoj en Esperanto; la dua – el 189 esperantigitaj el la portugala. Por kolekti tiom grandan elekton, Sylla Chaves kaj Neide Barros Rego serĉis en ĉiu ŝtato de tiu grandega Federacio, inter esperantistoj kaj neesperantistoj. Tio, certe, estis kolosa tasko, kiun oni povas nur admiri kaj laŭdi. Plie, la kompilintoj aldonis al la libro portretojn kaj mallongajn biografiojn pri la plimulto el la inkluditaj poetoj, kune kun notoj pri ĉiu poemo. Kvankam ambaŭ organizintoj mencias la spiritisman fonon de siaj familioj (kaj mi demandas min, kiel okazas, ke tiom da brazilaj esperantistoj estas tiel influitaj?), ili montras siajn toleremon kaj malfermitecon, per tio, ke en la kolekto estas prezentata ĉiu tipo kaj ideologio, trovebla en tiu vasta lando: tio estas ne nur spiritisma, sed ankaŭ ateisma, katolika, baptista, presbiterana, socialisma, maldekstrula kaj dekstrula. Multaj el la poetoj estas alte edukitaj, aliaj malpli aŭ tute ne. Ĉi tie troviĝas poemoj, kies aŭtoroj sekvas la riĉan tradicion de la klasika poezio de Portugalio, el kie devenis la lingvo kaj la prapatroj de multaj

brazilanoj. Kaj inter la originalaj esperantaj poemoj, kaj en la tradukitaj estas veraj literaturaĵoj, verkitaj de elstaraj poetoj, bone konataj de la esperantistaro: Geraldo Mattos, Leopoldo Knoedt (eĉ pli renoma kiel tradukisto¹), Sylla Chaves mem, kaj Neide Barros Rego mem ktp. En la sekcio de tradukitaj poemoj estas reprezentataj kelkaj el la plej gloraj kaj famaj brazilaj poetoj, kiuj meritas esti konataj, ne nur en sia hejmlando, sed en la tuta mondo.

Tamen ĉe granda parto de la poemaro ne temas pri altaj literaturaĵoj. Estas ja inkluditaj belegaj sonetoj (antikva poezia formo, kiu ankoraŭ estas ŝatata de multege da poeziamantoj), sed ankaŭ simplaj, tamen sinceraj, versaĵoj, infanpoemoj, kantoj, naivaj kaj kortuŝaj versetoj, faritaj de malavantaĝuloj, kripluloj, malriĉuloj, blinduloj, ritmoj de *sambo* kaj *baião*, gaŭĉeskaj rimoj, popularaj *troboj*, humuraĵoj. Inter tiuj poetoj de la popolo estas homoj blankaj, nigraj, de indiĝena kaj de miksitaj raso. Ĉar Brazilo estas teritorio de enmigrado, ĝiaj loĝantoj devenas de multaj eŭropaj kaj neeŭropaj landoj kaj etnoj. Ĉiuj havas ion por kontribui al la bunta kultura teksaĵo de tiu fascina par-



to de la mondo – mondo nova, sed samtempe geologie kaj etne antikva.

Inter la literaturoj de la latinidaj lingvoj, monde konataj estas tiuj en la franca kaj itala. Malpli konata ekster la landoj de la antaŭa portugala imperio („la mondo, kiun Portugalio kreis”, laŭ la titolo de iama kajera publikigaĵo) estas la ne malpli respektinda kaj antikva literaturo en la lingvo de Gil Vicente kaj Luís de Camões. Tiu literatura tradicio de Portugalio daŭras ankoraŭ kun la verkaro de poetoj, kiel Jorge de Sena, kaj romanisto, kiel José Saramago, portugalo, naturalizita brazila. (La sonetoj de Geraldo Mattos kaj de diversaj aliaj originalaj kaj tradukitaj poetoj, kies poemoj aperas en ĉi tiu kolekto, memorigas min pri la verkaro de la grandaj portugalaj poetoj, kiujn mi studis, kiam mi estis juna.) Sed kiam la portugala lingvo estis transportata de la unuaj koloniizantoj al Brazilo, ĝi travivis tion, kion Ŝekspiro nomis „mara ŝanĝo”. Ĝi eksterordinare riĉiĝis sub la influo de la indiĝenoj (el kies idiomoj la brazila portugala lingvo pruntis multege da terminaro: planta, arba, besta, birda, ktp), la afrika kulturo de la antaŭaj sklavoj, la abundaj mirindaĵoj de la naturo, la inventemo kaj imago de la heterogena popolo, kunigita kaj kune fandita en la krisolo de la nova nacio kun novaj ideoj kaj konceptoj. El ĉio ĉi estiĝis la mirinde esprimoplenaj lingvo, literaturo, muziko kaj danco de Brazilo, la memnomita lando de „ordo kaj progreso”.

Tamen, ne ĉio en la historio kaj hodiaŭa socio de Brazilo estas bela kaj gaja. La poetoj, reprezentataj en ĉi tiu kolekto, ne preteratentas la pli malhelajn kaj malĝojajn epizodojn kaj aspektojn de la vivo: la periodon de la militaj diktatoroj, la brutuligon de infanoj, la mizeron kaŭzitan de senpluveco kaj diluvoj, minacon de klimataj ŝanĝoj, detruon de la praarbaroj, la suferojn de loĝantoj en la *faveloj*, la tristan memoron kaj heredaĵon de la sklaveco, la diskriminacion, la maljustecon kaj la malegalecon. Kontraŭ tiaĵoj la poetoj protestas kaj plendas. Kelkaj estis malliberigitaj aŭ maldungitaj dum la jaroj de la diktaturo, ĉar, evidente, en ĉiuj landoj la diktatoroj

(pensu pri Hitlero, Stalino, Franco, Pinochet) pli timas, punas kaj persekutas la poetojn kaj la trobadorojn – la „gerilanojn de la gitaro”, kiel nomis ilin iu argentina kantisto.

Sed kvankam en ĉi tiu poemaro troviĝas kelkaj malĝojaj kaj eĉ malesperaj (malmultaj!) poemoj, la plimulto respegulas optimismon, esperon, humuron, ĝojon, plezuron en la naturo, kaj kontenton pri la vivo.

Surprize multaj el la poetoj, kies poemoj estas tradukitaj, estas ankaŭ esperantistoj kaj partoprenas la noblajn sentimentojn de la iniciatinto de nia kara lingvo. Estas mirinde, kiel tiom da brazilanoj tiom bone parolas, rimas kaj kantas en la zamenhafa lingvo, ke oni preskaŭ havas la impreson, ke ili naskiĝis samtempe esperantlingvanoj kaj portugallingvanoj. Eble oni ne devas tro miri pri tio, ĉar la du lingvoj posedas sufiĉe multe da simileco. Iu iam eĉ asertis, malprave, sed ne tute sence, ke „Esperanto estas la plej moderna el la latinidaj lingvoj”.

Mi intencis citi kelkajn el la poemoj en la kolekto, sed mi sentas, ke tio estus iom diskriminacia. Ĉiuj estas interesaj, kvankam ne ĉio povas esti nomita granda poezio. Poemoj de kvar el la poetoj, kiuj estis nomumitaj „princoj de la brazilaj poetoj”, aperas en la tradukita sekcio de la verko, nome Olavo Bilac, Alberto de Oliveira, Olegário Marianno kaj Guilherme de Almeida. En piednoto mi mencias la esperantan tradukon de *La Luzidoj* fare de Knoedt. La poemo n-ro 109 estas elpreno el la longa verko *Homara (ne Homera!)* *Epopo* de Sylla Chaves, kiu klarigas: „(la poemo) havas la saman formon de *La Luzidoj*, sed malan sinteton, ĉi tie kontraŭa al glavoj, mondestroj kaj herooj klanaj”. Mi nur volus komenti, ke la aŭtoro de tiu nacia epopeo de Portugalio ne nur verkis bombastajn militemajn versaĵojn, sed ankaŭ teneran poezion, kiel la belegan soneton *Mia milda anim’*. Legantoj komparu kun ĝi la sonetojn (originalajn kaj tradukitajn) en ĉi tiu antologio.

Dum legado de la libro mi iom bedaŭris, ke la kompilintoj ne inkludis la portugallingvajn originalojn de la



poemoj en la tradukita parto. Mi ĝojis do, kiam mi legis en la „Vortoj de Sylla” je la fino de la verko, ke oni intencas publikigi la duan volumon kun la titolo *Poesias escolhidas (Elektitaj poemoj) do Parnaso Brasileiro de Esperanto*. Tio certe eĉ pli valorigos jam valoran verkon.

Konkludo: Unu el la plej inspiraj ĝis nun eldonitaj naciaj esperantaj antologioj. Dum ankoraŭ ekzistas tiaj poetoj kaj trobadoroj, restas espero por la homaro kaj la mondo!

Se vi ŝatas poezion, nepre aĉetu ĝin.

Garvan MAKAJ

Sylla Chaves kaj Neide Barros Rego (kompilintoj): *Brazila Esperanta Parnaso*. Eld. Oportuno, Rio-de-Janeiro, 2007. Proksimume 350 paĝoj ne numeritaj. Sen ISBN.

1. Leopoldo Knoedt kiel tradukisto: Krom la tradukoj en ĉi tiu kolekto, vidu, ekzemple, liajn imponajn versiojn: *La Luzidoj* de Camões (eld. Fonto), kaj *A raça menina* (La infana raso) de William Auld (eld. Fonto), kaj sur retpaĝoj de Esperantlingva Verkista Asocio).

En 2007 la legantoj de MONATO donacis 54 senpagajn abonojn al legemuloj en landoj kun malforta ekonomio, nome en Armenio, Benino, Burundo, Ĉilio, Ĉinio, Ganao, Irano, Kongo (D.R.), Kongo (okc.), Kubo, Madagaskaro, Nepalo, Niĝero, Niĝerio, Nikaragvo, Pakistano, Panamo, Rumanio, Serbio, Taĝikio, Tajlando, Tanzanio, Togolando, Tunizio, Ugando kaj Vjetnamio. Sed restas ankoraŭ aliaj, kiuj dezirus legi MONATOn sed ne kapablas pagi. Helpu al ili kaj subtenu la Abonhelpan Fonduson!



Sendu kiun ajn sumon al FEL aŭ al via kutima peranto, kun la mencio "Abonhelpa Fonduso de MONATO".

Se vi pagas la egalvaloron de unu abono aŭ pli, vi povas ankaŭ ekscii, kiu ricevis la abonon, kiun vi donacis, kaj eble ekkorespondi kun "via" leganto. Skribu tiucele al la eldonejo.

Nome de ĉiuj ricevontoj tre sinceran dankon!

Facillingva legolibro

Daŭre aperas nelongaj verkoj, kiuj utiligas malgrandan nombron de familiaraj vortoj kaj evitas kompleksajn gramatikajn formojn. La celo estas provizi lernantojn de la lingvo per facilaj legolibroj. De longe ekzistas tiucelaj listoj de taŭgaj vortoj. La plej konata estas la vortolisto uzata de la revuo *Kontakto*, kiu distingas klasojn de facileco. Supozeble la instruanto de Esperanto utiligus tiajn listojn, konigante al siaj studentoj la plej bazajn vortojn kaj la plej bazajn gramatikajn elementojn, iom post iom kondukante tiujn al utiligo de la tuta lingvo.

Tio multe kontrastas kun la tradiciaj lernolibroj, kiuj grandparte strebas konigi la tutan lingvon, ĉefe surbaze de listoj de afiksoj, verboformoj, gramatikaj kazoj kc. kc.

La arto verki legolibron laŭ la *Kontakto*-metodo estas malfacila, ĉar la verkanto devas elpensi interesan rakonton, ĝin esprimi per simplaj stilo kaj vortoj kaj scii klarigi malfacilajn esprimojn.

Ĉi tiu libreto, kiu ankaŭ senpage elŝuteblas per Interreto, rakontas pri la ĉiutaga vivo de juna brazila knabo. La

rakonto estas interesa, la stilo glata. Por tre junaj legantoj verŝajne, ĝi ne taŭgas, sed jes por pli aĝaj (ĉu eble ekde ok jaroj?).

Du avertoj, tamen:

1. La aŭtoro instruas kaj utiligas la afikson/radikon *iĉ* (virseksan ekvivalenton de *in*). Ekzemple: katino (*inseksa* kato), katiĉo (*virseksa* kato). Ĉu ĉi tia legolibro estas ĝusta loko, por instrui tian neortodoksan morfemon?

2. Post ĉiu ĉapitro de la rakonto (kutime 2-3-paĝa) sekvas ekspliko de vortoj uzitaj, kiuj ne estas en la baza vortolisto. Tiuj eksplikoj uzas nebazajn vortojn, kiujn preskaŭ neniu lernanto komprenas. Tio estas normala parto de la „facilaj” legolibroj de ĉi tiu tipo, sed malklaras, kiun celon ĝi havas.

Malgraŭ tiuj du avertoj, la verketo estas alloga kaj bele prezentita. Do por personoj, al kiuj tia legolibro utilas, mi rekomendas ĝin. (Kun escepto de la utiligo de *iĉ*!)

Donald BROADRIBB

Luiz Portella: *Ŝi estas mia amiko*. Eld. Pentuvio, Brazilo 2007. 38 paĝoj vinktitaj. ISBN 978-85-60661-00-8.

Prezo ĉe FEL: 1 eŭro + afranko.

La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL,

**Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.**



Tlf. + 32 3 234 34 00;
tlk. + 32 3 233 54 33;
rete: retbutiko@retbutiko.net;
skajpe [fel-monato](https://www.fel-monato.net)
aŭ per www.retbutiko.net.

Nina kaj la knabo

Tu ĉi printempo komenciĝis malbone por Nina kaj Bojan. Tute neatendite la posedantoj de la domo diris, ke Nina kaj Bojan liberigu la loĝejon.

„Ni devas denove serĉi alian loĝejon”, diris Nina, kaj ombro kovris ŝiajn okulojn.

„Ni loĝu en la vilaĝo Tilio”, proponis Bojan.

Ili havis tie etan domon, kiu restis de la gepatroj de Bojan.

„Ĉu en Tilio?” demandis Nina.

Ŝi estis bela virino kun rekta grektipa nazo, profundaj perlamo-koloraj okuloj kaj svelta korpo – eble unu el la plej belaj aktorinoj en la ĉefurbo.

Kiam ŝi kaj Bojan ekloĝis en Tilio, Nina decidis fari en la korto de la domo florgardenon. Ie iam ŝi legis, ke la floroj, la koloroj kaj la silento estas la plej bona kuracilo por la animo.

Ĉimatenne, kiam ŝi fosis la bedon, ŝi eksentis, ke iu rigardas ŝin. Nina levis la kapon kaj mire vidis sep-okjaran knabon, kiu senmova staris sur la strato ĉe la drata barilo de la korto kaj rigardis ŝin.

„Kiel vi nomiĝas?” demandis lin Nina.

„Petko”, respondis la knabo.

„Ĉu vi loĝas ĉi tie?”

„Jes,” li diris, „tie, malantaŭ la monteto”, kaj li montris al la monteto.

Liaj grandaj infanaj okuloj similis al verdaj juglandaj nuksoj, kaj lia rigardo estis pensema kaj revema. La knabo surhavis buntan ĉemizon je ruĝaj kaj nigraj kvadratoj kaj pantalonon, kiu jam estis mallonga por li, kaj videblis liaj maleoloj, liaj blankaj ŝtrumpetoj kaj malnovaj nigraj ŝuoj. En la vilaĝoj similajn nigrajn ŝuojn la gepatroj aĉetis, kiam la infanoj komencis frekventi la lernejon. Lia densa hararo similis al erinacaj pikiloj.

Petko staris ĉe la barilo kaj rigardis Ninan. Tiel pasis eble horo; poste li ne-

senteble malaperis tiel kiel nesenteble li estis aperinta. Nina tre miris, kiam la sekvantan matenon denove ŝi vidis Petkon ĉe la barilo. Kaj nun li denove staris silenta kaj senmova kiel hieraŭ. Nun ŝi demetis la ŝtofajn gantojn, per kiuj ŝi laboris, proksimiĝis al la korta pordo, malfermis ĝin kaj diris:

„Eniru, Petko! Bonvolu.”

La knabo kvazaŭ tion atendis. Li tuj eniris la korton. Nina gvidis lin al la domo, antaŭ kiu Bojan estis farinta laŭbon kun tablo kaj benko. Nina invitis la knabon sidiĝi, kaj ŝi alportis el la domo sukcon el rubusoj, pomojn kaj kekson. Ŝi proponis al Petko manĝi, sed li nur rigardis ŝin kaj ne moviĝis. Nina iom pli insiste invitis lin, kaj Petko apenaŭ manĝis el la kekso kaj trinkis iom el la rubusa suko.

„Ĉu vi lernas, Petko?”

„Jes,” li respondis, „mi lernas en la dua klaso.”

„Ĉu vi havas fraton aŭ fratinon?”

„Jes, mi havas du fratinojn, kiuj estas pli aĝaj ol mi.”

Petko ne estis tre parolema, sed Nina vidis, ke por li estas tre agrable sidi apud ŝi kaj rigardi ŝin. Post dek minutoj Petko ekstaris, mallaŭte diris al ŝi „ĝis revido”, denove alrigardis ŝin per siaj grandaj noksaj okuloj kaj foriris.

La sekvantan tagon li denove aperis, kaj Nina havis la senton, ke li ne foriros de ĉi tie kaj la tutan nokton li staris senmova ĉe la barilo, ĝuste tie, kie ŝi unuan fojon rimarkis lin. Ŝajnis al Nina, ke se li ne estas tie, io certe mankos kaj ĉirkaŭe ne estos tiel bele, agrable kaj alloga. La mateno ne estos tiel suna kaj freŝa, kaj la ĉielo ne brilos tiel blue. Nina lasis la plugpioĉon, denove malfermis la pordon kaj invitis Petkon enen. Hodiaŭ frumate ne ŝi estis aĉetinta en la vendejo kukon kaj lakton. Ŝi verŝis lakton en glason kaj metis antaŭ Petko teleron kun la varma



MAGNE HAAGEN GROTING

kuko. La knabo ne kuraĝis tuŝi la kukon kaj la lakton, sed Nina insistis, kaj li finfine ekmanĝis la kukon.

„Ĉu vi havas amikojn, Petko? Ĉu vi kune ludas?”

„Jes, ni ludas”, li respondis.

„Kie vi ludas?” demandis Nina.

Ŝi deziris ekscii ion pli pri li, pri lia familio kaj tial ŝi unue demandis pri liaj amikoj.

„Ni ludas en la arbaro”, klarigis Petko.

„Kion vi ludas?”

„Ni kaŝas nin, ni kolektas strobilojn.”

„Kaj kial vi ĉiutage venas ĉi tien?”

Tiu ĉi demando surprizis kaj konfuzis Petkon. Li palpebrumis per siaj palpebroj longaj kiel cejanoj, sed kiel ĉiu infano li ne povis mensogi, kaj li respondis sincere kaj naive:

„Vi estas tre bela.”

Nun Nina konfuziĝis. Ŝi ne atendis aŭdi ĝuste tion.

„Kion?” ŝi alrigardis lin.

„Vi estas tre bela”, ripetis Petko kaj klinis sian hirtan hararon.

Nina nur rigardis lin. Ili sidis silente kaj senmove, kaj ŝi eksentis, ke tiu

ĉi knabo kvazaŭ nesentoble kaj senbrue eniris ŝian animon kaj tie, en la koro, ŝi eksentis agrablan varmon.

Post kelkaj minutoj Petko ekstaris kaj kviete kaj silente foriris. Preskaŭ la tutan tagon Nina pensis pri li. Ŝi demandis sin, kiuj estas liaj gepatroj, kaj ĉu li estas bona lernanto – demandoj, al kiuj ŝi ne povis respondi – ŝi eĉ ne sciis lian familian nomon. Estis momentoj, en kiuj ŝajnis al Nina, ke ŝi mem elpensis tiun ĉi knabon. Eble li ne ekzistas, kaj Nina nur imagas, ke ĉiun matenon al ŝi venas iu knabo kun okuloj grandaj kiel verdaj juglandaj nuksoj, longe ŝin rigardas kaj poste diras al ŝi, ke ŝi estas bela, kaj foriras. Eble Nina profunde en si forte deziris, ke estu tia knabo, kiu venu al ŝi, kiu parolu kun ŝi kaj amu ŝin kiel patrinon. Ĉu ĉi tie en la profunda vilaĝa silento kaj en bela pitoreska naturo ŝi ne malsaniĝis, ĉu nesentoble ŝi ne malproksimiĝis de la realo kaj ne ekvivis en alia neekzistanta mondo?

Nina decidis demandi la najbarinon, ĉu ŝi ne konas Petkon. Posttagmeze ŝi

iris al la najbarino. Ili iom babilis, kaj Nina demandis, ĉu ŝi ne rimarkis iun knabon, kiu ĉiutage ekstaras ĉe la barilo de Nina.

„Kiel ne”, respondis tuj la najbarino. „Tio estas Petko, lia patro estas fervojisto, kaj ili loĝas tie, ĉe la arbaro.”

„Petko, jes”, diris Nina.

„Lia patrino forpasis, kiam ŝi naskis lin. Restis tri georfoj, Petko kaj du pli aĝaj knabinoj. La patro Spiridon ne edziĝis denove, kaj li mem zorgas pri la infanoj. Li laboras, bredas bovinon. Ĉiaŭtune Petko lernos en la tria klaso, kaj mi estas lia instruistino. Li estas diligenta, bona lernanto.”

Posttagmeze Nina kaj Bojan eksidis en la laŭbo. La somera tago malrapide foriris. Super la pinarbaro la suno dronis en kupra rivero. Kelkaj nubetoj videblis sur la firmamento similaj al infanaj balonoj. Bojan verŝis vinon en la glasojn, poste eniris la domon, portis de tie malnovan mantelon kaj metis ĝin sur la ŝultrojn de Nina. Ja, estis iom malvarme, blovis montara vento.

„Dankon”, diris Nina.

„Pri kio vi pensas?” demandis ŝin Bojan.

„Pri la knabo, kiu ĉiumatene venas kaj ekstaras ĉe nia barilo”, respondis Nina.

„Eble li venas ĉi tien por ŝteli ion”, diris Bojan.

Tiuj ĉi neatenditaj vortoj skuis kaj kvazaŭ pikis Ninan. Ŝi alrigardis lin, kaj la rideto en ŝiaj belaj kolombkoloraj okuloj tuj malaperis.

„Kion vi parolas?” ŝi diris. Tiu ĉi knabo estas orfo. Lia patrino mortis, dum la nasko. La knabo neniam prononcis la vorton „panjo”.

Bojan mire alrigardis ŝin. Li ne povis kompreni, kiel Nina tiel forte koleriĝis. Li deziris demandi ŝin, ĉu gravas, ke la knabo neniam prononcis la vorton „panjo”, sed li nenion diris. Ja, li kaj Nina ne havis infanon, kaj ŝajnis al Bojan, ke de kiam la knabo venas kaj ekstaras ĉe la barilo de ilia korto, Nina kvazaŭ iĝis pli bela, pli trankvila kaj pli feliĉa.

Julian MODEST



Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandanino. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbedaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturaj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo. Certe ĝi rangas apud la noveloj de Trevor Steele; kaj el la ĉefaj novelmajstroj de nia pasinteco, apud tiuj de Stellan Engholm kaj Ferenc Szilagyi.”

ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
Prezo ĉe FEL: 24,00 €
+ afanko.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio;
www.retbuto.net, retbutiko@retbutiko.net, aŭ ĉe via kutima librejo.

anoncetoj

Vizitu Iperity, la virtualan Esperanto-vilaĝon, kie pli ol 750 Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.iperity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provekzemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Aŭ ĉu vi preferas liston de difinita aŭtoro, ekzemple de la verkoj de Jorge Camacho aŭ de Sikosek? Eble vi volas nur scii, kiu estas la aŭtorino de La ŝtona urbo? Ĉio tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

27 EUR

30 USD

aŭ egalvaloro

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromerkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6587

LA GAZETO

**MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA**

PETU PROVNUMERON ĈE
LA GAZETO – 55210 CREUE (Francio)

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

REGULAJ KUNLABORANTOJ: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp
lk@free.fr

Stefan Maul

El verva vivo ĵurnalista



Faktoj kaj spertoj el la vivo de la ĉefredaktoro de



En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO.

Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustaĵoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de MONATO.

Prezo: 20,00 EUR + aŭfranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:

Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be